

decembro 1967



NEDERLANDA ESPERANTISTO

Monata Organo de la Nederlanda Esperantisto-Asocio
„La Estonto Estas Nia” - 32-a jara n-ro 12

Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk.
Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 5,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

LA INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN VIENO 40-JARA

Dum kunveno en Danzig de la delegitoj de la landaj organizaĵoj je la 31-a de julio 1927a Felix Zamenhof, frato de la aŭtoro de Esperanto, faris la proponon establi ie en la mondo internacian Esperanto-Bibliotekon.

Reveninte hejmen s-ro Hugo Steiner, iama ĉefinspektoro de la Aŭstria Federaciaj Fervojoj, kaj nun Kortega Konsilanto, tuj ekagis. Li vizitis la Federacian Kancelieron, kiu tuj promesis helpi. En la iama ĉevalejo en la korto de Rechnungshof Steiner prunte ricevis tablon, du seĝojn kaj forneton, krome 200 ŝilingojn por hejti la stalon.

Pro la libro-donacoj en- kaj eksterlandaj jam en 1928 la stalo fariĝis tro malgranda.

Pro la turmenta zorgo de kie preni la bezonatan monon Steiner ekhavis la ideon alligi la muzeon al la Nacia Biblioteko. La ĝeneral-direktoro de la Nacia Biblioteko, universitata profesoro D-ro Josef Bick, kun kiu s-ro Steiner preparolis tion, disponigis al Steiner unu kaj poste du ĉelojn de la iama monaĥejo de la Augustenanoj.

La 30-an de septembro 1928-a la kontrakto inter la Nacia Biblioteko kaj la socio I.E.M.W. estis subskribata. Per ĝi la materialo de la I.E.M.W. iĝis sendanĝera kaj la Nacia Biblioteko transprenis la kostojn por la laŭorda traktado de la materialo.

Komence de aŭgusto 1929-a okazis en Budapeŝto la 21a U.K. kaj laŭ propono de s-ro Steiner estis en Vieno la antaŭkongreso, dum kiu estis la festa inaŭguro de la I.E.M.W. en la pomsalonego de la Nacia Biblioteko.

Laŭ ordono de la Kanceliero d-ro J. Schober, Steiner ricevis grandegan salondon en „Neue Hofburg”.

Kompreneble s-ro Steiner ne plu povis fari la laboron sola, kunlaborantoj de li estis s-ro Gustav Weber kaj d-ro Hugo Maier.

La ĉiam amasiĝinta materialo povis esti prilaborata. Preskaŭ senesepte ĉio estas donacoj kelkfoje tre imponaj.

Ne ĉiam la laboro por I.E.M.W. estis facila, dum la milito la Gestapo fermis ĝin kaj ŝtelis la ŝparmonon. S-ro Steiner estis ŝirmarestata.

Post la milito li tuj daŭrigis sian laboron kaj nun la muzeo disponas pri 5 salonegoj en Hofburg. La fondinto de la muzeo estas en kontraktaj rilatoj kun la Ministerio kaj ricevas monan rekompencan.

Ĉefestraro, redaktoro, kunlaborantoj kaj administranto de nia organo kaj la gvidanto de la Libroservo deziras al ĉiuj anoj ĝojigajn festotagojn kaj bonan transpason en la novan jaron.

ASOCIAJ INFORMOJ

La ata/ita-afero.

La ĉefestraro decidis, ke ekde la venonta N.E.-numero ne plu aperu artikoloj pri-traktantaj la ata/ita-aferon.

Oni rajtas recenzi pri ĉiaj verkoj. La estraro esperas nur, ke la recenzantoj ne misuzu la okazon por detale pri-trakti la supere menciitan aferon.

Al ĉiuj sekcioj.

La ĝenerala sekretariino petas al ĉiuj sekcioj estonte ne plu miksi komunikojn pri novaj membroj, adresŝanĝoj kaj ekŝiĝoj kun aliaj komunikoj. Bonvolu sendi ilin ĉiam aparte.

Adresŝanĝoj.

Ĉefestrarano s-ro B. R. Beekhuijsen al: Groenland 5, Delfzijl.

Sekretario de la sekcio Leiden, s-ro René Wassenaar, al: Boerhavelaan 49, Leiden (tel.: 5 32 83).

Sekretario de la sekcio Zeist, s-ro P. Enkelaar, al: Willem Pijperlaan 31, Zeist.

Sekretario de N.E.J., s-ro R. C. Groeneveld, al: James Wattstraat 75, K. 654, Amsterdam 6 (tel.: 57181, aparato 654).

Elektio de ĉefestrarano en la jarkunveno 1967.

Laŭvice ekŝiĝos:

s-ro J. Calado, aganta prezidanto. (relektebla).

s-ro B. R. Beekhuijsen (komuniko pri lia eventuala reelektebleco ankoraŭ sekvos). Pasintan jaron jam ekŝiĝis s-ro H. Kervers.

I.E.M.W. eldonas Informilon, kiu ĉiam enhavas novaĵojn pri Esperanto el la tuta mondo. La abono kostas nur 8 respond-kuponoj jare.

La 30-an de septembro la Viena Lernejkonsilanto d-ro Neugebauer inaŭguris memortabulon pri la fondo de la I.E.M.W. en la korto de Rechnungshof kaj transprenis ĝin en la ŝirmo de la urbo Vieno. Multaj aŭtoritatuloj ĉeestis, i.a. la ĝenerala direktoro de la Aŭstria Nacia Biblioteko, kiu skizis la historion de la muzeo. („La Verda Stelo”, monata bulteno de la Groningena Esperantoklubo, 15-a Jarkolekto, n-ro 1).

Groningen.

M. Meijwes.

La sekcioj estas petataj sendi nomojn de kandidatoj por la vakantaj lokoj (precipe por la prezidanta loko) ANTAŬ 1-2-'68 al la ĝenerala sekretariino s-ino J. C. Heetkamp-Senstius (vidu art. 29 „Algemeen Huishoudelijk Reglement”).

Propozoj por la jarkunveno.

Propozojn por la sekvonta jarkunveno, kiu okazos 25-5-1968 en Utrecht, la sekcioj estas petataj sciigi al la ĝenerala sekretariino ANTAŬ 15-2-1968. Propozoj kiuj envenos post tiu dato, ne estos pri-traktataj.

Ensendotaj raporto.

Laŭ art. 33 „Alg. Huish. Regl.” niaj reprezentantoj en F.E.N. (f-ino Vermaas kaj s-ro Calado), la Institucio Esp. bij het Onderwijs” (s-ro Beekhuijsen), U.E.A. (komitatoj s-ino Kervers kaj s-ro Woessink) peranteco U.E.A. (financa flanko s-ino Lok-van Putten kaj propaganda agado s-ro Calado), Ekzamena Komitato (f-ino d-dinoMiddelkoop kaj s-ro Weeke) estas petataj sendi la koncernajn raportojn ANTAŬ 15-2-1968 al s-ino Heetkamp-Senstius, la ĝenerala sekretariino.

EL LA SEKCIOJ

Sekcio Amersfoort.

Sekr.: St. van der Hagenlaan 6.

S-ino J. Döbken-Mulder †

Mortis la 15-an de oktobro 1967 en la aĝo de 76 jaroj kaŭze de grava akcidento nia anino s-ino J. Döbken-Mulder.

Ŝi estis deposed la starigo de nia sekcio en 1945 unu el la plej fidelaj kaj fervoraj anoj. Ŝi ĉiam provis disvastigi la lingvon Esperanto kaj interesigi aliajn pri ĝi.

Ŝia morto estas grava perdo por nia sekcio kaj ni neniam forgesos ŝin.

Sekcio Groningen.

Sekr.: Bosboom Toussaintstraat 21.

La agado por televidkurso en Esperanto.

Al ĉiuj sekcioj kaj individuaj membroj, kiuj tiel bone reagis al nia „urĝa alvoko”, por garantiĝi monsumon por eventuala televida-kurso en Esperanto, ni povas komuniki ke hodiaŭ, la 4-an de novembro estas garantiita la sumo de f 10.136,—. Kiam vi legas ĉi tion, certe tiu sumo estas ankoraŭ pli, ĉar ni ankoraŭ atendas multajn promesojn.

El la multegaj leteroj, kiujn ni ricevis, montriĝis ke ĉiuj estas entuziasmaj por la grandskala propagando.

Kompreneble multe dependas nun de la pluaj agadoj de F.E.N. Ni deziras, ke ili havu sukceson kaj se la kurso ne sukcesos en la nova sezono, ke ili persistu, ĉar la „persistemulo ĉiam venkas”.

Ĉar estas ankoraŭ neeble al ni persone danki ĉiujn, ni ĉiloke plej kore dankas ĉiujn pro la kunlaboro, kaj ni esperas siatempe per cirkularo doni al vi pli da informoj pri la atingita sumo, k.t.p.

Ankaŭ de la neneŭtralaj organizaĵoj ni ricevis garantiumojn, sed ilin mi dankos per iliaj organoj.

Sekcio Zaandam.

Sekr.: P. L. Takstraat 64.

La Zamenhof-kunveno okazos lundvesperon la 11an de decembro en unu el la salonoj de Doopsgez. Weeshuis, Stationsstraat 6, Zaandam. Prelegos nia landa estrarano kaj eks-prezidanto s-ano O. Hoekstra.

Dimanĉon la kvinan de novembro mortis nia ano Cornelis Joannes Prins. Kvankam estante jam iom maljuna li malgraŭ tio apartenis al la plej aktiva parto de nia membraro. Li atingis la aĝon de 62 jaroj. Nia kondolenco eliras al liaj geparencoj.

La estraro de sekcio Zaandam.

Komponaĵoj de s-ro Dirk Schipper.

Radio Budapeŝt sonbendigis la tutan verkon de s-ro Dirk Schipper, t.e. la komponaĵoj de la Zamenhofaj poemoj: „Tre Ofte”, „La Preĝo sub la Verda Standardo”, la „Kapelo” (en du komponaĵoj), „Mia Penso”, „Ho, mia Kor’” kaj „Pluvas kaj Pluvas”. Ili estas ĉiuj kantataj de s-ino Koopmans.

SEMAJNFINO DE FAULHABER FONDAĴO

La 4an kaj 5an de Nov. pasinta okazis en la junulargastejo „Grasheuvel” en Amersfoort, la kvara semajnfino de la Faulhaber-fondaĵo (frata-institucio de nia Mabesoone-fondaĵo), kiun ĝi organizis por la membroj (kaj nemembroj) de F.L.E., dum kiu okazis prelegoj, sekvataj de demandoj kaj diskutado.

En la sabat-vespero s-ino Burgler-Jezsó prelegis pri Julio Baghy. Ŝi priskribis lian vivon kaj verkaron. Poste ŝi deklamis kelkajn poemojn liajn kaj aŭdigis diskon eldonitan en Jugoslavio kun deklamo de poemoj de Julio Baghy.

Dimanĉmatene s-ro Michaud, el Parizo, prelegis pri „Rasismo, konscia kaj nekonscia”. Bazinte sin sur la difinoj en Plena Vortaro li prezentis la diversajn formojn de rasismo en la socio. Per tio li skuis niajn konsciencojn, demonstrante ke en preskaŭ ĉiu homo ekzistas ia formo de nekonscia rasismo. Laŭ li la solvo por tiu malbono estas memedukado por venki antaŭjuĝojn.

Dimanĉposttagmeze s-ro Faulhaber prelegis pri „Emociaj Vortoj en Esperanto”. En tre sprita maniero li montris kiel en momentoj de emocio la esperantistoj povos esprimi siajn koleron, malestimon, ktp. S-ro F. enlistigis multajn vortojn kaj esprimojn, ĉefe el la verkoj originalaj de la fratoj Rossetti.

La tuta aranĝo estis bona sukceso, al kio sendube helpis la bonaj organizado kaj sfero.

Laŭ nia opinio ankaŭ L.E.E.N.-anoj profite povus partopreni en tiuj renkontiĝoj. Ŝajnas al ni tamen konsilinde ke, en la estonto, la organizantoj devus enlistigi almenaŭ unu prelegon pri difinita problemo el la Esp.-movado aŭ la lingva bariero ĝenerale.

Rotterdam.

J. Calado.

HEROLDO DE ESPERANTO: Aktuala; sola Esp.-gazeto ne-asocia.

Aperas 18-foje jare. Jarabono f 15,—

NORDA PRISMO: Kultura, socia, literatura revuo.

Aperas kvaronjare. Jarabono f 10,—

Reprezentas Libro-Servo L.E.E.N., Borniastr. 95, Leeuwarden.

Poŝtk. 7 69 15.

53-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MADRID, 3 — 10 aŭgusto 1968

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

OFICIALA KOMUNIKO

No. 3 Rotterdam, la 30-an de okt. 1967

Aliĝkotizoj. Ekde la 1-a de jan. 1968 validas la jenaj kotizoj:

Kongresano 77,— gld.

Junulo ĝis 20-jara 23,— gld.

Edz(in)o 33,50 gld.

Univ. Studento 38,50 gld.

Blindulo 31,— gld.

Individua Membro de UEA, kiu ricevas la Jarlibron kaj la Revuon „Esperanto” rajtas rabaton de 20,— gld.

Tiu ĉi rabato validas nur por la kategorio „Kongresano”.

Enirvizoj. La oficialaj instancoj en Hispanujo garantiis al LKK ke enirvizoj estos donitaj sen distingo pri la landoj, el kiuj venas la kongresanoj.

G. G. Pompilio,

Konstanta Kongresa Sekretario

La IV-a Internacia Esperantista Ferio 17-30.IX.1968 - Miedzygorze - Pollando

Post granda sukceso de la Tria IEF, kiun partoprenis 450 geesperantistoj el 15 landoj, i.a. el Novzelando, Usono kaj Japanujo, de 17 ĝis 30 septembro 1968 en pitoreska montara ripozloko Miedzygorze okazos la IV-a Internacia Esperantista Ferio. Partoprenkostoj 108 ned. gld.

Detalaj informoj pri la Ferio, aliĝiloj kaj invitiloj estas riceveblaj de: Pola Esperanto-Asocio, Okcidenta Regiono, WROCLAW-17, Poŝtkesto 8, str. Dubois 3,

50-a Jubilea Belga Kongreso.

Je Pentekosto 1968, 1-3 junio, okazos la 50-a Jubilea Belga Kongreso en Bruselo. Eksterlandaj kongresanoj ne pagas kotizon.

Aliĝiloj kaj informoj haveblaj ĉe la sekretariino de L.K.K., f-ino M.F. Bauwens, 14 Av. Charles Quint, Bruselo 8. Tel. 27 34 84.

La Feriaj Kursoj en Arhus, 15-21.X.'67.

Tro rapide forpasis la kurso en Arhus en Danlando. Partoprenis 58 personoj el 10 landoj. Tre internacian parolarton oni tiel lernas. Al ĉiu mi povas rekomendi partopreni en la kurso. La gvidantoj estas lertaj - la sfero tre agrabla - la „hotelo” luksa - la manĝo abunda: Oni multe lernas en unu semajno, tion mi mem speras. La arhusanoj estas tre aktivaj - helpis nin kie ili nur povis kaj tre agrablis al ni la semajnon. Gesinjoroj Friis povas esti tre kontentaj pri la granda sukceso. Do sekvantan fojon ankaŭ vi partoprenu en Helsingör aŭ Arhus.

I. Dijkhoff-Lenze.

RADIO-SERVO F.E.N.

La sekvantaj stacioj ŝanĝis la ondolongojn kaj nun elsendas jene:

BERN lunde kaj merkrede 13.05-13.15 horo je 31.46 m 48,66m 75,28m (= 9535, 6165, 3985 kHz)
ĵaude kaj sabate 22.50-23.00 horo je 48.66m (= 6165, 3985 kHz)

BUDAPEST ĉiutage 20.30—20.45 horo. je 16,77m 30,51m 41,55m 42,25m 48,10m 50,83m 75,09m 240m (= 17890, 9833, 7220, 7100, 6234, 5902, 3995, 1250 kHz)

ROMA dimanĉe 21.00-21.20 horo je 30.90m 41,24m 50,08m (= 9710, 7275, 5990 kHz)

VARSOVIO ĉiutage 16.30—17.00 horo. je 25,09m 25,42m 25,59m 31,50m 41,99m 42,11m 50,25m (= 11955, 11800, 11725, 9525, 7145, 7125, 5970 kHz)

VIENO ĉiun duan vendredon: 17/11, 1/12, 15/2 k.t.p. 15.30-15.45 horo je 203,4 m (= 1475 kHz)

W. Böttcher,

Kwelderstr.46, Leeuwarden

Manuskriptoj por iu numero de „N.E.” atingu la redakcion antaŭ la 10-a de la antaŭa monato. Ni nur akceptas ilin, se ili estas tajpitaj unuflanke de la papero, kun larĝa marĝeno, kaj verkitaj en Esperanto.

La Redaktoro.

TRA LA LIBRARO

UTILA MANLIBRO PRI HINDUJO de M. Haudebine, 76 paĝoj, formato 19 x 25 cm. Eldonis Hinda Instituto de Esperanto, New Delhi, 1967. Prezo: 5 gld. Antaŭparolo de M. Haudebine kaj Enkonduko de S. S. Mahant, Prezidanto de la Hinda Instituto de Esperanto. Kovrilo de Jiwana Adalja.

En aparta letero la sekretario de la Instituto petas la indulgon de la legonto pro la aspekto kaj la preso de la libreto. En ege malfacilaj cirkonstancoj oni devis prizorgi la eldonon, kiun oni ne plu volis prokrasti. Malgraŭ pluraj korektadoj restis eraroj, sed ĝi estas la unua eldonaĵo presita en Hindujo mem.

Ni volonte pardonas, ĉar la enhavo estas ege interesa kaj instrua; per la flua stilo, en perfekta Esperanto.

La leganto konatiĝas kun por eŭropanoj tro malmulte konataj aferoj kaj problemoj de tiu vastega regno.

Vi povas legi pri la hinda popolo, lando, artoj, vivo, lingvoj, gazetaro, historio, religioj kaj festoj, civilizacioj, kalendaro, flago, emblemo, sociaj servoj, familia planado, sanitaro, edukado, skribsistemoj, kasto, geografio k.t.p. Ĉu el la diversaj temoj ampleksas unu, du paĝojn, kio faciligas la legadon.

Ni admiru la entreprenemon de niaj hindaj samideanoj kaj tiun de Sinjorino Haudebine! La aktuala kaj utila manlibro do estu en la manoj de ĉiuj admirantoj de la malproksima oriento.

Mr. A. M. Slot-v.d. Meulen.

BRILO DE FANTOMO, rakonto originala en Esperanto de s-ino Margid Thoraeus-Ekström. Formato 15 x 21 cm., broŝurita, 72 paĝoj. Eldonis Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj. Prezo dkr. 7,50 mendebla ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Leeuwarden.

En la lastaj jaroj la Dana Esperanto-eldonejo estas tre fervora, enmondigante kelkajn interesajn librojn bonlingvaj.

Jen aperis novelo en facila lingvaĵo de la svedino „Thoraeus-Ekström, kies nomo estas iom konata pro aliaj verkaĵoj aperintaj en la Esperanta gazetaro. Ne temas pri iu fantoma rakonto, sed pri novelo tipe virineca, miksaĵo de fantazio, naiveco kaj mistiko, en kiu iom mankas la ek-

vilibro. Nur post legado de kelkaj paĝoj oni ekscias ke la rakonto estas speco de konfeso, sed pri la konfesiganto la informo estas fine de la verketo. Tamen aliflanke la enhavo estas meritplena: la maniero laŭ kiu la aŭtorino scias skizi la etajn problemojn kaj fantaziaĵojn de junulino, la postan nostalgion al la naskiĝloko, la sentojn en fremda kaj malamika mondo, certe streĉos la atenton de la leganto, precipe de la legantino. Estas klare ke s-ino Thoraeus en sia privata vivo - estante akuŝistino - bone observas la animkirliĝojn kaj karakterizaĵojn de la virino kaj posedas la econ skribe redoni ilin.

La lingvaĵo estas simpla, tial taŭga por komencantoj. Ensteliĝis kelkaj kompost-eraroj. Prezento, kiel kutime, bona.

P. M.

FREŜA MATENO de Reuven Kritz, romano tradukita el la hebrea lingvo de Ota Ginz. Ilustraĵoj de Jona Kollman. Formato 18 x 11 cm., kartone bindita, 280 paĝoj. Eldonis „PURA”, Kiryat Motzkin (Israelo). Prezo 24 steloj (ŝ 6,-). Mendebla ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Leeuwarden.

Prave la tradukinto enkonduke sciigas ke verko el la nova hebrea literaturo ĝis nun nur nesufiĉe estas reprezentata en Esperanto. La israela verkisto Reuven Kritz estas ŝatata precipe de la junularo, ĉar liaj libroj temas pri la vivo de la juna generacio en la nova ŝtato Israelo. La ĉefrolulo en la prezentata nova traduko estas aŭstria knabo, fuĝinta kun sia patro al la tiama Palestino. Tie li estas edukata en t.n. „kibuco”, speco de kooperativa vilaĝo. Verve la aŭtoro scias pentri la konfliktojn kaj problemojn, kiuj alfrontas la junulon en la nova medio. La leganto konatiĝas kun la vivo en kibuco kaj estas instruita pri vivo alispeca ol en propra lando. Tial la enhavo estas bonega legaĵo kaj por ĝejnuloj kaj por pli aĝaj legantoj. La stilo estas simpla, ofte en interparola formo kaj la lingvo uzita en la traduko estas bona sen superflua neologismoj. Estas rimarkinde, ke la necesaj klarigoj estas prezentataj sube de la koncentraj paĝoj (kaj resume kolektitaj fine de la libro), kio faciligas la legadon, kvankam tiuj pri la hebreaĵoj (Purim, Bar Mievva, Jom Kipur, Pesah) estas tro koncizaj.

LIBRO-SERVO L.E.E.N., BORNIASTRAAT 95, LEEUWARDEN
POŝTKONTO 7 69 15

Multaj verkoj tuj el stoko livereblaj, i.a.:

Maskerado ĉirkaŭ la morto f 10,50	La sorto de l'homo f 8,—
La naŭzo (bind.) f 14,25	Reĝo Lear f 16,50
Esperanta novelarto f 14,25	Ora duopo f 6,50
Jaroj sur tero f 8,50	Ĉielarko f 4,30

Diversaj antologioj kaj klasikaj verkoj

Ĉiaj lernolibroj, studverkoj, vortaroj k.t.p. Gramofondiskoj.

Eble pro la influo de la originala lingvo enestas en la traduko kelkaj nekutimajoj kaj/aŭ neklaraĵoj; ekz. paĝo 18: Rafi (estas la nomo de la ĉefrolulo) oni sendis el la najbaroj (?); 37: unu lia mano estas apogita per kubuto al la genuo (komplika teniĝo); 43: kaj kion via paĉjo laboris antaŭe (prilaboris, laborakiris); 22: la neologismo koncedi (koncesii); kamentubisto (kamenskrapisto, kamenpurigisto); 153: gvidi la kontlibrojn (librotenadi); 200 okulbrovoj (pleonasmio); 228: veturi laŭ trampa maniero (petveturi); 276: haltigas (haltas); ŝi restas stari kiel frapita (haltas aŭ restas staranta kvazaŭ frapita). Da komposteraroj estas deko, tamen ne ĝenantaj. Libro havinda, kiu pro la iniciatita traduko nepre trovu vastan merkaton.

P. M.

Bondeziraj Bildkartoj.

U.E.A. eldonis du seriojn de bondeziraj bildkartoj kun teksto en Esperanto por Kristnasko kaj Novjaro, nome:

1. Serio de 6 duoblaj kartoj kun kovertoj „Mondfamaj Pentraĵoj” (Rembrandt, Da Vinci, Breughel, Renoir, Van Gogh, Utrillo). Teksto: Agrabajn Festotagojn kaj Feliĉan Novan Jaron. Bonaj koloraj reproduktaj. Prezo: 3,75 gld.; 15 steloj.
2. Serio de 6 poŝtkartoj novjaraj „Ora Jarcento Holanda” (Rembrandt, Vermeer k.a.). Belaj reproduktaj. Teksto: „Feliĉan Novan Jaron” bildflanke. Titolo de la bildo en nederlanda, angla, franca, germana kaj en Esperanto. Prezo de la serio 1,50 gld.; 6 steloj.

Ni volonte rekomendas uzon de ambaŭ seriojn al ĉiu, kiu en la jarfino volas sendi bondezirojn al amikoj en- aŭ/kaj eksterlande.

H. G.

GRAMOFONDISKO

JEN NIA MONDO (Relax 7002) nova 30 cm longedaŭra disko en Esperanto. kantita de la DUO ESPERA (gefratoj Hanny kaj Adri.) Tre plaĉa kovrilo kolora kaj aparte ĉiuj tekstoj de la kantoj. Eldonis IRAMAC, Bussum.

Prezo f 16,50; mendebla ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Leeuwarden

Iom malfrue ni ricevis la novan diskon por recenzo (prijugoĵ ja aperis antaŭ monatoj en kelkaj aliaj gazetoj).

IRAMAC meritas la dankon de la esperantistaro, kaj ne nur tion, sed ankaŭ multopan aĉeton, pro la eldono de la unua stereofona longedaŭra disko en Esperanto. S-ro Wouter Pilger - konata kiel premiito en la belartaj konkursoj de UEA - tradukis 8 ofte audigatajn kantojn anglalingvajn de Dylan kaj Seeger. Kantas ilin la gefratoj Hanny kaj Adri, aperintaj en nederlanda resp. belga radio kaj televido, kun orkestra kaj ĥora akompano. La muzikan aranĝadon faris Melle Weersma.

Estas konate ke la enhavo de multaj modernaj kantoj estas ofte naiva, por ne diri nesignifa. Tial tradukado en Esperanton ne estas facila tasko. Se ni konsideras la tekstojn, ni povas konstati, ke ili estas ĝenerale bonaj kaj melodie facile kanteblaj.

Denove pruviĝas, kion la esperantistoj jam delonge scias, ke Esperanto pro la belsoneco estas tre taŭga por kantado. Se tamen ni havas iujn rimarkojn, ili rilatas la prononcon de la kantistoj, kiuj evidente ne estas (spertaj) esperantistoj. Sed kiuj nederlandaj kantistoj senripoĉe prononcas la modernajn anglalingvajn kantojn? La muzika aranĝado de Melle Weersma estas kontentiga, kvankam oni ŝatus ie kaj tie iom da vervo. Sed tio estas afero de gusto.

Jen la titoloj de la kantoj: Se havus mi martelon (If I had a hammer), Israela lulkanto (Israeli lullaby), Venkos ni en gloro (We shall overcome), Ĉiuj floroj estas for (Where have all the flowers gone), Tamen: ĉio en ordo (Don't think twice, It's all right), Kun helpo de Dio (With God on our side), Jen via mondo (This land is your land) kaj Blovas la Vent' (Blowin' in the wind). Kiel sciante, sufiĉe konataj modernaj kantoj, precipe por la junularo.

La esperantistoj aĉetu la diskon ne nur por si mem, sed por donaci al aliaj personoj, tiel montrante la belsonecon kaj taŭgecon de Esperanto. Cetere la disko estas ludebla ne nur stereofone, sed ankaŭ monofone.

Laŭdinda iniciato de IRAMAC!

P. M.

ĈE LA 108-A NASKIĜTAGO DE ZAMENHOF JE LA 15-A DE DECEMBRO

Pri la vorto „Majstro”

„La aŭtoro de Esperanto en la Kongreso devas esti rigardata kiel mortinto kaj neckzistanta; por la kongreso devas ekzisti nur la afero” k.t.p. . . . Ĉio ĉi tio ne estas „modesteco” de mia flanko - ĝi estas „necesio”. Nia afero prosperados nur en tia okazo, se ĝi estos ĉiam *absolute senpersona*” „Uzante la okazon, mi nun ripetos publike tion, kion mi jam ofte diris kaj skribis private: mi kore petas ĉiujn esperantistojn, ke en siaj leteroj al mi aŭ en sia buŝa parolado kun mi ili neniam uzu la vorton „majstro”, kiu estas al mi tre malagrabla, sed ili ĉiam uzu simple la vorton „sinjoro”.

(El: *Memorlibro pri la Zamenhofjaro, Londono, 1960, p. 26, citita laŭ „Leteroj de L. L. Zamenhof, I, pp. 120 kaj 126).*

NOVJARAJ KUTIMOJ

La kutimo doni unu al la alia okaze de la nova jaro ion devenas el kaj simpla kaj komplikita fontoj. Simpla, se ni pensas pri la ĝenerala signifo de la kutimo mem kaj esploras la sencon de la japana novjara deziro: „O-ni wa soto - fuku wa uchi” („For ĉiuj demonoj, eniru la feliĉo!”) (Se la malnova jaro devas kunpreni la malfeliĉon, tiuokaze la pliriĉiĝo kaj la feliĉo, kiuj estas sekvoj de la interŝanĝo de donacoj, estas konsiderataj antaŭsigno ke la nova jaro daŭru tiel prospera kiel ĝi komenciĝis.

Ĉe la Romanoj la komercistoj malfermis la butikojn por mallonga tempo je la unua tago de la jaro por fari komercojn, kiuj estis rigardataj bona antaŭsigno por la daŭro de la jaro. Ankaŭ tie estis la kutimo organizi festojn en la dua parto de decembro, ĉe kiuj oni disdonis kandelojn (transprenitaj de ni por la kristnaskarboj) kaj pupojn, baktajn el speldo, speciale por la infanoj.

En la unua periodo de la moderna historio la regnestroj kutimis akcepti novjardonacojn kiel ekstrajn enspezojn kaj krome kiel pruvo pri la fideleco de siaj subuloj. Estas konate ke Reĝino Elizabeto I de Anglujo kalkulis je la ricevo de tiuj novjardonacoj por havi poŝmonon kaj vestaĵaron. De siaj nobeloj ŝi ricevis ekzemple jupojn, silkajn ŝtrumpojn, mantelojn, dum la kuracistoj alportis potojn kun zingibro, bonbonojn k.t.p.

Dum la Renesanco pingloj kaj butonoj - tiam novaĵoj - estis bonvenaj novjardonacoj. La kutimon sendi novjarkartojn oni transprenis de la Japanoj.

Ke la donado de donacoj okaze de la nova jaro povis sin teni, oni povas klarigi el la fakto ke ĉiuj popoloj, ĉu ili loĝas en la enaj landoj de Afriko, ĉu en Okcident-Eŭropo, opinias ke estas pli bone ricevi certajn aĵojn ol esti devigataj aĉeti ilin mem. La Maorioj de Nov-Zelando kredis ke objekto ricevis magian forton, tuj kiam ĝi fariĝis donaco. Tiu ĉi donaco forĝis restantan ligadon inter doninto kaj ricevinto. Ankaŭ la kutimo de la Romanoj, oferi donacon ŝajnas rezulto el la sama kredo. Kaj por la Romanoj kaj por la Maorioj donacoj estis objektoj de kiuj eliris speciala forto nur pro la simpla ago de la dono. De kie venis tiu forto? Per la interŝanĝo de donacoj la homoj esprimas en videbla maniero la internan spiriton

NEDERLANDA ESPERANTO-ASOCIO „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Aganta prez.: S-ro J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 25b, Rotterdam-12.
Tel.: 0 10 - 18 94 81.

Sekr.: S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage.
Tel.: 0 70 - 66 96 69.

Kasistino: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort, (Z.).
Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de: Alg. Penningm. Ned. Esp. Ver.
L.E.E.N., Brederodelaan 36, Santpoort-Zuid.

KONCIZE

Rajtoj de lingvaj malplimultoĵ.

Pli ol 40 delegitoj de 17 landoj partoprenis la Eŭropan Konferencon pri Lingvaj Malplimultoĵ, kiu okazis en Oslo dum aŭgusto. Inter la nacimalplimultaj lingvoj reprezentitaj estis la bretona, la lapona, la makedona kaj la kimra.

En sia inaŭgura parolado s-ro Kjell Bondevik, la norvega Ministro pri Ekleziaj aferoj kaj Edukado, diris, ke ne sufiĉas nur toleri lingvajn malplimultoĵn, sed necesas doni al ili juran rajton je respekto. Alia parolanto, prof. Magne Oftedal, atentigis, ke la amaskomunikiloj kaj la hodiaŭa distraĵa industrio minacas eĉ la ekziston mem de la lingvaj malplimultoĵ. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

Ni uzu taŭgan sloganon!

Tiel skribas s-ro A. Lienhardt el Mulhouse: Estas tuj videble, ke la sloganoj „Parlez-vous Esperanto?” - „Sprekt u Esperanto?” k.t.p. estas multe pli elvokivaj ol ofte uzataj nunaj varbsloganoj, ekz. la imperativa, tro altruda kaj do

de komunuma sento - de spontanea akcepto de reciproka dependeco.

Tia novjarfesto, dum kiu floroj kaj frandaĵoj, kravatoj kaj kartoj iras de mano al mano, do ne estas priridinda. Kontraŭe, ĝi estas la tago, en kiu ĉiuj homoj konscias ke la socio, en kiu ili vivas, estas bazita sur la principo de doni kaj ricevi.

El Unesco Features: „Novjar-kutimoj de la tuta Mondo”, Claude Levi-Strauss.

malbonefika „Lernu Esperanton!”, ĉar tiuj demandaj frazoj kun la verbo „paroli” tuj komprenigas al ne-informitaj eksteruloj ke Esperanto estas parolebla kaj parolata lingvo. La frazo vekas respondon (nuntempe plej ofte nean, kompreneble) kaj samtempe vekas sciemon.

Kiu volas korespondi pri la uzo de la proponita slogano, povas fari tion laŭ malsupra adreso:

Esperanto-Societo, F-68 MULHOUSE, 24 av. de Riedisheim, Francujo.

La societo sendos interŝanĝe franclingvan afiŝeton kun la slogano „Parlez-vous Espéranto?” kaj kun prova aldona argumento.

Esperanto-fako en Universitata Biblioteko.

Laŭ la sugesto de Sarlanda Esperanto-Ligo la Universitata Biblioteko de Saarbrücken deklaris sin preta fondi Esperanto-fakon. Ĉiuj materialoj pri Esperanto estos registritaj en la alfabeto katalogo kaj en aparta faka katalogo.

La Biblioteko akceptas ĉiaspecajn donacojn de libroj kaj revuoj. Pro oportuneco oni sendu provizore la materialon al la adreso de Sarlanda Esperanto-Ligo D-6653 Blieskastel, Schloszbergstr. 51), kiu ĝin ordigos kaj transdonos.

INTERNACIA RENKONTIĜO

de komercistoj esperantistoj okazos dum la printempa foiro 1968 en Leipzig, sabaton, 9.3., 19a horo, en: Klub der Intelligenz „Gottfried Wilhelm Leibniz”, Elsterstr. 35.

Post modesta kulturprogramo estos eblecoj konversaciadi laŭdezire. Interesuloj anoncu partoprenon al: Germana Kultur-ligo - Esperanto, GDR 701 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Str. 115.

